LA VERDA KAKATUO

UNUAKTA

GROTESKAĴO DE ARTURO SCHNITZLER

TRADUKITA

DE

JOH·SCHRÖDER

WIEN 1912

MONDFORMATO
16½ : 11½

PREZO
Sm 0·75

LA VERDA KAKATUO

UNUAKTA GROTESKAĴO

DE

ARTURO SCHNITZLER

TRADUKITA

DE

JOH. SCHRÖDER

WIEN 1912
KOMISIE ĈE
DRUCKEREI- UND VERLAGS-AKTIENGESELLSCHAFT
VORM.
R. v. WALDHEIM, JOS. EBERLE & CO.

PERSONOJ:

EMILO, duko de CADIGNAN.*)
FRANCISKO, vicgrafo de NOGEANT.
ALBENO, kavaliro de la TREMOUILLE.
MARKIZO de LANSAC.
SEVERINO, lia edzino.
ROLLIN, poeto.
PROSPERO, mastro, iama teatrodirektoro.
HENRIKO, BALTAZARO, VILHELMO, SCEVOLO, JULIO, STEFANO, MAŬRICO, GEORGINJO, MIKANJO, FILIPINJO, geaktoroj.
LEOKADIO, aktorino, edzino de HENRIKO.
GRASSET, filozofo.
LEBRÊT, tajloro.
GRAIN, vagabondo.
Komisario, nobeloj, aktoroj, aktorinoj, civitanoj kaj civitaninoj.

TEMPO kaj LOKO: la vespero de la 14a de Julio 1789 en la kabareto de PROSPERO en PARIZO.

---

*) La nomoj estas francaj, do francalingve parolataj.

Preseraroj.

Sur paĝo 7, linio 7 legu: MASTRO anstataŭ: MASTO.
„ „ 7, „ 9 „ de nove „ denove.
„ „ 14, „ lasta legu: familiohistorioj anstataŭ: familio historioj.
„ „ 15, „ 14 legu: ? anstataŭ: .
„ „ 19, „ 10 „ min iu anstataŭ: miniu.
„ „ 21, „ 6 „ forpasis „ for pasis.
„ „ 22, „ antaŭlasta legu: jam apenaŭ anstataŭ: apenaŭ jam.
„ „ 24, „ 18 legu: eĉ vi anstataŭ: vi eĉ.
„ „ 25, „ 13 „ Adiaŭ, Prospero anstataŭ: Adiaŭ. Prospero
„ „ 26, „ 4 „ de nove anstataŭ: denove.
„ „ 29, „ 5 forstreku la vorton: vin.
„ „ 35, „ 21 legu: Ĉu anstataŭ: Cu.
„ „ 45, „ 6 „ forpasos anstataŭ: for pasos.
„ „ 50, „ 5 „ belvesti „ bel vesti.
„ „ 50, „ 22 „ tiom „ Tiom.
„ „ 58, „ 18 „ Bone! „ BONE!
„ „ 59, „ 17 „ alapartenas „ al apartenas.
„ „ 62, „ 3 „ antaŭ Vi: (al GRAIN).
„ „ 62, „ 15 „ Ŝi anstataŭ: Si.
„ „ 63, „ 9 „ ! „ .
„ „ 64, „ 7 „ LEOKADIO anstataŭ: LEOKADIO.

La gastejo ĉe „LA VERDA KAKATUO“.

Kelo ne granda, al kiu dekstre (malproksime malantaŭe) kondukas sep ŝtupoj fermitaj supre per pordo. Alia pordo, apenaŭ rimarkebla, estas maldekstre malantaŭe. Aro de simplaj tabloj el ligno, ĉirkaŭ ili seĝoj, preskaŭ tute plenigas la ejon. Maldekstre, en la mezo, la vinverŝejo; post ĝi aro de bareloj kun kranoj. La ĉambro estas lumigita per oleolampetoj pendantaj de la plafono.

PROSPERO, la mastro. La civitanoj GRASSET kaj LEBRÊT eniras.

GRASSET (ankoraŭ sur la ŝtupoj): Ĉi tien eniru, Lebrêt; mi konas tiun ĉi fonton. Mia delonga amiko kaj direktoro havas ankoraŭ nun ie kaŝitan barelon da vino, se eĉ la tuta Parizo mortas per soifo.

MASTRO: Bonan vesperon, Grasset. Ĉu vi foje vidigas vin de nove? Ĉu fino de la filozofio? Ĉu vi emas de nove akcepti engaĝon*) ĉe mi?

---

*) Engaĝo: F. engagement; A. engagement; G. Engagement (de aktoroj).

GRASSET: Nu certe ne! Alportu vinon. Mi estas gasto, vi la mastro.

MASTRO: Vinon? De kie mi prenu vinon, Grasset? Hodiaŭ nokte ili ja elrabis ĉiujn vinvendejojn en Parizo. Kaj mi vetas, ke vi estis inter ili.

GRASSET: Donu la vinon. Por tiuj kanajloj, kiuj post ni venos post unu horo . . . (spione aŭskultante): Ĉu vi aŭdas ion, Lebrêt?

LEBRÊT: Ĝi sonas kiel mallaŭta tondro.

GRASSET: Brave, civitanoj de Parizo . . . (al PROSPERO): Por tiuj kanajloj vi certe havas ankoraŭ iom provize. Do, donu ĝin. Mia amiko kaj admiranto, la civitano Lebrêt, tajloro el la „Rue Saint Honoré", pagos ĉiom.

LEBRÊT: Certe, certe, mi pagos.

PROSPERO hezitas.

GRASSET: Nu, montru al li, ke vi havas monon, Lebrêt.

LEBRÊT elpoŝigas sian monujon.

MASTRO: Nu, mi vidos, ĉu mi . . . (Li malfermas la kranon de unu barelo kaj plenverŝas du glasojn): El kie vi venis, Grasset? Ĉu el „Palais Royal"?

GRASSET: Jes . . . mi parolis tie. Jes, mia kara, nun estas mi en la vico. Ĉu vi scias, post kiu mi parolis?

MASTRO: Nu?

GRASSET: Post Kamilo Desmoulins! Jes, mi kuraĝis. Kaj diru al mi, Lebrêt, kiu akiris pli grandan aplaŭdon, ĉu Desmoulins aŭ mi?

LEBRÊT: Vi . . . sendube.

GRASSET: Kaj kiel mi prezentis min?

LEBRÊT: Belege.

GRASSET: Ĉu vi aŭdas ĝin, Prospero? Mi starigis min sur tablo . . . . mi havis aspekton kiel monumento . . . . jes, kaj ĉiuj mil, kvinmil, dekmil kolektiĝis ĉirkaŭ mi, ĝuste tiel same kiel pli frue ĉirkaŭ Kamilo Desmoulins . . . . kaj ĝojkriis al mi.

LEBRÊT: La ĝojkrioj estis eĉ pli fortaj.

GRASSET: Jes . . . . ne multe pli, sed ili estis pli fortaj. Kaj nun ili ĉiuj marŝas al la Bastiljo . . . . kaj mi povas diri: ili obeis mian vokon. Mi ĵuras al vi, antaŭ vespere ni ĝin posedos.

MASTRO: Jes, certe, se ĝiaj muroj falus per viaj paroloj!

GRASSET: Kio . . . . paroloj! Ĉu vi estas surda? Jen, oni pafas. Niaj bravaj soldatoj estas inter ili. Ili havas la saman inferan furiozon kontraŭ tiu malbenita arestejo, kian ni. Ili scias, ke post tiuj muroj sidas arestitaj iliaj fratoj kaj patroj . . . . Sed ili tamen ne pafus, se ni ne estus parolintaj. Mia kara Prospero, la potenco

de l' spiritoj estas granda. Jen .... (al LEBRÊT): Kie vi havas la skribaĵojn?

LEBRÊT: Jen .... (Li elpoŝigas broŝurojn.)

GRASSET: Jen estas la plej freŝaj broŝuroj, kiuj ĵus estis disdonataj en „Palais Royal". Jen unu de mia amiko Cerutti, memorskribaĵo por la franca popolo, jen unu de Desmoulins, li ja pli bone parolas ol skribas .... La „libera Francujo"!

MASTRO: Kiam do fine aperos la via, pri kiu vi ĉiam rakontas?

GRASSET: Ni pluan ne bezonas. La tempo por faroj venis. Fripono estas, kiu hodiaŭ sidas inter siaj kvar muroj. Kiu estas viro, tiu devas iri eksteren, sur la straton!

LEBRÊT: Brave! Brave!

GRASSET: En Tulono ili mortigis la urbestron, en Brinjolo ili elrabis dekduon de domoj .... nur ni en Parizo estas ankoraŭ nun prokrastemuloj kaj toleras ĉion.

MASTRO: Tion oni jam ne povas diri.

LEBRÊT (kiu konstante trinkis): Antaŭen, civitanoj, antaŭen!

GRASSET: Antaŭen! .... Ŝlosu vian butikon kaj iru kun ni!

MASTRO: Mi venos jam, kiam estos tempo por ĝi.

GRASSET: Jes, certe, kiam plu ne estos danĝero.

MASTRO: Mia kara, mi amas la liberecon same kiel vi, sed antaŭ ĉio mi havas profesion.

GRASSET: Por la civitanoj de Parizo nun ekzistas nur unu profesio: liberigi siajn fratojn.

MASTRO: Jes, por tiu, kiu nenion alian havas por fari!

LEBRÊT: Kion li diras? . . . Li mokas nin!

MASTRO: Mi eĉ ne pensas tion. Sed preferu nun foriri . . . la prezentado ĉe mi baldaŭ komenciĝos. Tiam vi ne taŭgos ĉi tie por mi.

LEBRÊT: Kia prezentado? Ĉu estas ĉi tie teatro?

MASTRO: Certe, ĉi tie estas teatro. Via amiko kunludis ĉi tie ankoraŭ antaŭ du semajnoj.

LEBRÊT: Vi ĉi tie ludis, Grasset? . . . Kial vi lasas ĉi tiun bubon senpune moki pri vi?

GRASSET: Trankviliĝu . . . tio estas vero; mi ludis ĉi tie, ĉar tiu ĉi ne estas ordinara gastejo .... ĝi estas restejo por krimuloj .... venu ...

MASTRO: Unue pagu.

LEBRÊT: Se ĉi tie estas gastejo por krimuloj, mi ne pagos eĉ unu suon.*)

MASTRO: Klarigu do al via amiko, kie li estas.

GRASSET: Ĉi tiu estas stranga loko! Homoj venas ĉi tien, kiuj ŝajnigas sin krimuloj, kaj aliaj, kiuj estas tiaj kaj ne sentas ĝin.

---

*) suo = F. sou, franca monero, la plej malaltvalora.

LEBRÊT: Tiel — ?

GRASSET: Mi vin atentigas, ke tio, kion mi nun diris, estis tre sprita; ĝi povus fari la feliĉon de tuta parolado.

LEBRÊT: Mi komprenas neniom da tio, kion vi diras.

GRASSET: Mi ja diris al vi, ke Prospero estis mia direktoro. Kaj ankoraŭ nun li ludas komediojn kun siaj aktoroj, sed aliamaniere ol pli frue. Miaj iamaj gekolegoj dise sidas ĉi tie kaj ŝajnigas sin krimuloj. Ĉu vi komprenas? Ili rakontas historiojn, kiuj starigas la harojn kaj kiujn ili neniam travivis; ili parolas pri krimoj, kiujn ili neniam faris; kaj la publiko, kiu venas ĉi tien, havas la agrablan tiklon, ke ili sidas inter la plej danĝeraj kanajloj en Parizo, inter friponoj, ŝtelrompistoj, mortigistoj .... kaj ...

LEBRÊT: Kia publiko?

MASTRO: La plej elegantaj homoj en Parizo.

GRASSET: Nobeloj ...

MASTRO: Sinjoroj korteganaj ...

LEBRÊT: Ili pereu!

GRASSET: Tio estas io por ili. Tio skue vekas iliajn enuigitajn sentojn. Ĉi tie mi komencis, Lebrêt, ĉi tie mi parolis la unuan fojon, kvazaŭ por ŝerco ... kaj ĉi tie mi komencis

malami tiujn hundojn, kiuj kun siaj belaj vestoj, parfumitaj, satmanĝegintaj, sidadis inter ni . . . kaj tio tute bonvenas por mi, mia bona Lebrêt, ke foje vi vidas tiun lokon, el kiu eliris via granda amiko. (Kun alia tono): Diru, Prospero, se la afero malsukcesus . . .

MASTO: Kia afero?

GRASSET: Nu, la afero de mia politika kariero... Ĉu vi denove akceptus min engaĝe?

MASTRO: Ne, por la tuta mondo ne!

GRASSET (facile parolante): Kial ne? Eble ankoraŭ iu alia povus superiĝi preter via Henriko...

MASTRO: Sen konsidero al tio . . . mi timus, ke iufoje vi povus forgesi pri vi mem kaj serioze atakus unu el miaj pagantaj gastoj.

GRASSET (flatite): Tio certe estus ebla.

MASTRO: Mi . . . mi mem ja estas majstro pri mi —

GRASSET: Efektive, Prospero, mi devas diri, ke mi admirus vin pro via sinmajstrado, se mi ne scius hazarde, ke vi estas malkuraĝulo.

MASTRO: Ho, mia kara, sufiĉas al mi, kion mi povas efiki en mia fako. Mi havas sufiĉe da plezuro el tio, ke mi povas diri al tiuj buboj mian opinion en iliajn vizaĝojn kaj insulti ilin laŭ la deziro de mia koro, dum ili konsideras tion kiel ŝercon. Tio ankaŭ estas

ia maniero, senigi sin de sia furiozo. (Li eltiras ponardon kaj briletigas ĝin.)

LEBRÊT: Civitano Prospero, kion signifas tio?

GRASSET: Ne timiĝu. Mi vetas, ke tiu ponardo eĉ ne estas akrigita.

MASTRO: Vi tamen povus erari, mia amiko; foje ja venos tiu tago, en kiu el ŝerco fariĝos seriozo, kaj por tiu mi ĉiuokaze estas preparinta min.

GRASSET: Tiu tago estas proksime. Ni vivas en grava tempo! Venu, civitano Lebrêt, ni volas iri al la niaj. Prospero, adiaŭ, vi revidos min kiel grandan viron aŭ neniam.

LEBRÊT (ŝancelirante): Kiel grandan viron . . . aŭ . . . neniam.

(Ili foriras.)

MASTRO (restas, sidiĝas sur tablo, malfermas broŝuron kaj legas por si): „Nun la besto estas en kaptilo; sufoku ĝin!“ — Li skribas ne malbele, tiu eta Desmoulins. „Neniam ankoraŭ prezentis sin al venkintoj akiraĵo pli riĉa. Kvardekmil palacoj kaj kasteloj, du kvinonoj da ĉiuj bienoj en Francujo estos la rekompenco por via braveco — kiuj konsideris sin konkerintoj, estos subigataj, la nacio estos purigata.“

KOMISARIO eniras.

MASTRO (rigardas lin ekzamenante): Nu, la kanajloj alvenas hodiaŭ tre frue!

KOMISARIO: Mia kara Prospero, kun mi ne faru ŝercojn; mi estas la komisario de via kvartalo.

MASTRO: Kaj per kio mi povas servi?

KOMISARIO: Mi havas ordonon, ĉeesti hodiaŭ vespere en via gastejo.

MASTRO: Tio estos aparta honoro por mi.

KOMISARIO: Ne pro tio estas, mia tre bona Prospero. La registaro volas klarigon pri tio, kio efektive okazas ĉe vi. De kelkaj semajnoj —

MASTRO: Ĉi tie estas loko por amuzoj, nenio plu.

KOMISARIO: Lasu min finparoli. De kelkaj semajnoj ĉi tiu ejo estas laŭdire scenejo por diboĉaj orgioj.

MASTRO: Vi estas malĝuste informita, sinjoro komisario. Ĉi tie oni faras ŝercojn, nenion plu.

KOMISARIO: Per ili oni komencas. Mi scias tion. Sed ĝi finiĝas alie, diras mia informo. Ĉu vi estis aktoro?

MASTRO: Direktoro, sinjoro komisario, direktoro de tiu bonega aktoraro, kiu ludis lastaloke en Deniso.

KOMISARIO: Tio estas indiferenta. Vi tiam ricevis malgrandan heredaĵon?

MASTRO: Ne inda, paroli pri ĝi, sinjoro komisario.

KOMISARIO: Via aktoraro disiris?

MASTRO: Ankaŭ mia heredaĵo.

KOMISARIO (ridetante): Tre bone. (Ambaŭ ridetas. — Subite serioze): Vi establis gastejon —

MASTRO: Kiu mizerege prosperis.

KOMISARIO: — post tio vi havis ideon, kies ielan originalecon oni ne povas neigi.

MASTRO: Vi fierigas min, sinjoro komisario.

KOMISARIO: Vi rekolektis vian aktoraron kaj lasas ilin ludi ĉi tie strangan kaj ne sendanĝeran komedion.

MASTRO: Se ĝi estus danĝera, sinjoro komisario, mi ne havus mian publikon — mi povas diri, la plej noblan publikon en Parizo. La vicgrafo de Nogeant ĉiutage estas mia gasto. La markizo de Lansac ofte venas; kaj la duko de Cadignan, sinjoro komisario, estas la plej fervora admiranto de mia unuaranga aktoro, de la fama Henriko Baston.

KOMISARIO: Certe ankaŭ de la arto aŭ de la artifikoj de viaj aktorinoj.

MASTRO: Se vi konus miajn etajn aktorinojn, sinjoro komisario, vi neniun en la mondo riproĉus pro tio.

KOMISARIO: Ĉesu. Oni raportis al la registaro, ke la amuzoj, kiujn viaj — kiel mi diru —

MASTRO: La vorto „artistoj“ sufiĉos.

KOMISARIO: Mi decidiĝos uzi la vorton „subjektoj“ — ke la amuzoj, kiujn viaj subjektoj prezentas, en ĉiu senco trosuperas la permesiton. Laŭdire ĉi tie paroloj estas dirataj de viaj — kiel mi diru — de viaj artefaritaj krimuloj, paroloj, kiuj — kiel ja diras mia informo? (Li legas en notlibro kiel jam pli frue) — estas ne nur malĉastaj, kio malmulte nin ĝenus, sed ankaŭ kapablaj efiki treege ribelige — kio en tempo tiel ekscitoplena, kia estas tiu, en kiu ni vivas, tute ne povas esti indiferenta por la registaro.

MASTRO: Sinjoro komisario, tiun ĉi akuzon mi povas respondi nur per ĝentila invito, ke vi mem unufoje observu la aferojn. Vi rimarkos, ke tute nenio ribeliga okazas ĉi tie, jam tial, ke mia publiko ne estas ribeligebla. Ĉi tie oni simple ludas teatron — tio estas ĉio.

KOMISARIO: Vian inviton mi kompreneble ne akceptas, sed mi restas, rajtigita de mia ofico.

MASTRO: Mi opinias, ke mi povas promesi al vi la plej bonan amuzon, sinjoro komisario, sed mi permesas al mi konsili al vi, demetu la kostumon de via ofico kaj aperu ĉi tie en

civilaj vestoj. Se oni nome vidus ĉi tie komisarion en uniformo, la naiveco de miaj artistoj same tiel estus embarasata de tio kiel la humoro de la publiko.

KOMISARIO: Vi estas prava, sinjoro Prospero; mi foriros kaj revenos kiel juna eleganta sinjoro.

MASTRO: Tio estos facila por vi, sinjoro komisario; ankaŭ kiel fripono vi estus bonvenita — tio ne kaŭzus senzacion — nur ne kiel komisario.

KOMISARIO: Adiaŭ. (Li foriras.)

MASTRO (kun komplimento): Kiam venos tiu benita tago, en kiu mi vin kaj viaspecajn . . .

KOMISARIO (kuntrafas ĉe la pordo kun GRAIN, kiu eniras en vesto treege ĉifonita kaj ektimiĝas, kiam li vidas la KOMISARION. Tiu unue rigardas lin esplorante, tiam li ridas kaj turnas sin ĝentile al PROSPERO): Jam unu el viaj artistoj? . . . . (Li foriras.)

GRAIN (parolas ploreme, patose): Bonan vesperon.

MASTRO (longatempe observinte lin): Se vi estas unu el mia aktoraro, mi ne volas reteni mian laŭdon por vi, ĉar mi ne rekonas vin.

GRAIN: Kion vi opinias?

MASTRO: Ne ŝercu, deprenu la perukon, mi ja deziras scii, kiu vi estas. (Li ŝiras liajn harojn.)

GRAIN: Ho ve!

MASTRO: Ili ja estas malfalsaj! Tondro kaj fulmo ... kiu vi estas? ... Ŝajnas, ke vi ja efektive estas vagabond.

GRAIN: Jes.

MASTRO: Kion do vi deziras de mi?

GRAIN: Ĉu mi havas la honoron kun la civitano Prospero? ... mastro ĉe la verda kakatuo?

MASTRO: Tiu mi estas.

GRAIN: Mi nomas min Grain ... kelkfoje Carniche ... ĉe aliaj okazoj „la krianta pumiko" ... sed sub la nomo Grain mi estis arestita, civitano Prospero, kaj tio estas la esenca.

MASTRO: Ha ... mi komprenas. Vi volas esti engaĝata de mi kaj vi tuj ludas ion antaŭ mi. Ankaŭ bone. Daŭrigu.

GRAIN: Civitano Prospero, ne konsideru min kiel trompiston. Mi estas honesta homo. Se mi diras, ke mi estis arestita, tio estas plena vero.

MASTRO rigardas lin malkonfideme.

GRAIN (tiras paperon el la jako): Jen, civitano Prospero. El tio vi vidas, ke hieraŭ posttagmeze je la kvara mi estis elarestigita.

MASTRO: Post dujara aresto ... Tondro kaj fulmo, tio ja ankaŭ estas malfalsa!

GRAIN: Ĉu vi dubis ankoraŭ nun, civitano Prospero?

MASTRO: Kion vi faris, ke oni por du jaroj vin —

GRAIN: Oni estus pendiginta min; sed feliĉe mi estis ankoraŭ duone infano, kiam mi mortigis mian kompatindan onklinon.

MASTRO: Sed, viro, kial oni ja povas mortigi sian onklinon?

GRAIN: Civitano Prospero, mi ne estus farinta ĝin, se la onklino ne estus trompinta min kun unu el miaj plej bonaj amikoj.

MASTRO: Via onklino?

GRAIN: Jes — ŝi estis pli intima kun mi, ol kutime onklinoj estas kun siaj nevoj. Estis strangaj familiorilatoj .... mi estis kolerigita, treege kolerigita. Ĉu mi povas rakonti tion al vi?

MASTRO: Rakontu, eble ni povos kontrakti.

GRAIN: Mia fratino estis ankoraŭ duone infano, kiam ŝi forkuris el la hejmo — kaj kion vi opinias — kun kiu?

MASTRO: Tion diveni estas malfacile.

GRAIN: Kun sia onklo. Kaj li forlasis ŝin — kun infano.

MASTRO: Kun kompleta, mi esperas.

GRAIN: Estas maldelikate de vi, civitano Prospero, ŝerci pri tiaj aferoj.

MASTRO: Mi diros ion al vi, vi krianta pumiko; viaj familio historioj min enuigas .Ĉu vi opinias,

ke mi vivas, por lasi de ĉiu alkurinta vagabondo rakonti al mi, kiun li mortigis? Kiel ĉi tio koncernas min? Mi supozas, ke vi volas ion de mi —

GRAIN: Jes, civitano Prospero, mi venis, por peti laboron de vi.

MASTRO (moke): Mi atentigas vin, ke ĉe mi ne ekzistas onklinoj mortigotaj; ĉi tie estas loko por amuzoj.

GRAIN: Ho, al mi sufiĉis tiu unu fojo. Mi volas iĝi honesta homo — oni direktis min al vi.

MASTRO: Kiu, se mi havas permeson por demandi.

GRAIN: Aminda juna viro, kiun ili arestis ĉe mi en la sama ĉelo antaŭ tri tagoj. Li nun estas sola. Lia nomo estas Gastono . . . kaj vi konas lin —

MASTRO: Gastono? Nun mi scias, kial mi ne vidis lin de tri vesperoj! Unu el miaj plej bonaj aktoroj por elpoŝoŝtelistoj. — Li rakontis historiojn — ha, oni estis skuata de rido.

GRAIN: Jes. Kaj nun ili lin kaptis.

MASTRO: Kial kaptis? Li ja ne ŝtelis efektive!

GRAIN: Sed jes. Tamen tiu certe estis la unua fojo, ĉar li, ŝajnas, agis nekredeble mallerte. Pripensu — (konfidencie): — sur „Boulevard des

Capucines“ simple tiri el la poŝo de sinjorino monujon — vera diletanto. Vi konfidigas min, civitano Prospero — kaj mi konfesas al vi — ke estis iu tempo, en kiu ankaŭ mi faris tiaspecajn bagatelojn, sed neniam sen mia kara patro. Kiam mi ankoraŭ estis infano, kiam ni ankoraŭ ĉiuj loĝis kune, kiam vivis ankoraŭ mia kompatinda onklino —

MASTRO: Kial vi lamentas? Mi tion konsideras kiel malkonvenan. Vi ja ne devis mortigi ŝin!

GRAIN: Tro malfrue. Sed, kion mi celis — akceptu min ĉe vi. Mi volas iri vojon kontraŭan de tiu de Gastono. Li ŝajnigis sin krimulo kaj fariĝis tia — mi . . .

MASTRO: Mi faros la eksperimenton kun vi. Vi efikos jam per via masko. Kaj en taŭga momento vi simple rakontos la aferon pri la onklino. Precize tiel, kiel ĝi okazis. Iu ja demandos vin.

GRAIN: Mi vin dankas, civitano Prospero. Kaj koncerne mian salajron —

MASTRO: Hodiaŭ vi ludos gaste por engaĝo; mi do ne povas ankoraŭ pagi al vi salajron. — Vi ricevos bonajn manĝon kaj trinkon . . . kaj kelkajn frankojn por dormejo mi ankaŭ ne ŝparos.

GRAIN: Mi vin dankas. Kaj al viaj ceteraj

aktoroj vi min simple konatigos kiel gaston el provinco.

MASTRO: Ho ne . . . al ili mi diros tuj, ke vi estas efektiva mortiginto. Tion ili multe preferos.

GRAIN: Pardonu, mi ja nenion volas diri kontraŭ mi — sed tion mi ne komprenas.

MASTRO: Kiam vi pli longatempe estos aktoro, vi ja komprenos.

SCEVOLO kaj JULIO eniras.

SCEVOLO: Bonan vesperon, direktoro!

MASTRO: Mastro . . . kiel ofte ankoraŭ mi diru al vi, ke la tuta ŝerco estos perdita, se vi min nomas „direktoro“.

SCEVOLO: Kiu ajn vi estas, mi opinias, ke hodiaŭ ni ne ludos.

MASTRO: Kial ne?

SCEVOLO: La homoj ne havos humoron. — — Infera bruo estas en la stratoj kaj precipe antaŭ la Bastiljo ili kriegas kiel demoniakoj.

MASTRO: Kiel tio koncernas min? De monatoj estas tiu ĉi kriado kaj nia publiko ne forrestis. Ili amuzas sin same kiel pli frue.

SCEVOLO: Jes, ili havas la gajecon de homoj, kiuj tre baldaŭ estos pendigitaj.

MASTRO: Ke mi do tion ĝisvivu!

SCEVOLO: Donu al ni dume ion por trinki,

ke mi akiru humoron. Hodiaŭ mi tute ne havas humoron.

MASTRO: Tio okazas ofte al vi, mia kara. Mi devas al vi diri, ke hieraŭ mi estis tute malkontentigita de vi.

SCEVOLO: Kial do, se mi havas permeson por demandi?

MASTRO: Tiu historio pri ŝtelrompo, kiun vi rakontis, simple estis stulta.

SCEVOLO: Stulta?

MASTRO: Jes. Tute nekredinda. Nura kriegado ne estas sufiĉa.

SCEVOLO: Mi ne kriegis.

MASTRO: Vi ja ĉiam kriegas. Efektive, iĝos necese, ke mi studas kun vi la deklamojn. Al viaj elpensitaĵoj oni ne povas konfidi. Henriko estas la ununura.

SCEVOLO: Henriko kaj ĉiam Henriko. Henriko estas fiaktoro. La ŝtelrompo hieraŭ estis majstraĵo. Ion tian Henriko ne povos fari dum tuta sia vivo. — Se mi por vi ne taŭgas, mia kara, simple mi iros ĉe vera teatro. Ĉi tie ja tamen estas nur teatraĉo ... Ha ... (Li rimarkas GRAIN'on): Kiu estas tiu? ... Li ja ne apartenas al ni? Ĉu vi eble iun novan engaĝis? Kian maskon havas tiu bubo?

MASTRO: Li estas efektiva mortiginto.

SCEVOLO: Ho, se vere . . . (Li iras al li): Tre ĝoja, konatiĝi kun vi. Scevolo estas mia nomo.

GRAIN: Mi nomas min Grain.

JULIO promenis dum tuta tiu tempo en la gastejo, kelkfoje li haltis, kiel turmentata interne.

MASTRO: Kio do estas kun vi, Julio?

JULIO: Mi parkerigas.

MASTRO: Kion?

JULIO: Admonojn de konscienco. Hodiaŭ mi ŝajnigos miniu, kiu sentas admonojn de konscienco. Kion vi diras pri tiu ĉi sulko, jen, sur mia frunto? Ĉu mi ne havas aspekton, kvazaŭ ĉiuj furioj de l'infero min . . . (Li de nove promenas.)

SCEVOLO (kriegas): Vinon — donu vinon!

MASTRO: Trankviliĝu . . . neniom da publiko ĉeestas ja ankoraŭ.

HENRIKO kaj LEOKADIO eniras.

HENRIKO: Bonan vesperon. (Per facila gesto li salutas la malantaŭe sidantojn): Bonan vesperon, sinjoroj!

MASTRO: Bonan vesperon, Henriko! Kion mi vidas? Kun Leokadio?

GRAIN (atente observis LEOKADIO'n; al SCEVOLO): Ŝin mi ja konas . . . (Li parolas mallaŭte al la ceteraj.)

LEOKADIO: Jes, mia kara Prospero, — estas mi.

MASTRO: Dum unu tuta jaro mi vin ne vidis. Lasu min saluti vin. (Li volas kisi ŝin.)

HENRIKO: Preterlasu tion! (Lia rigardo ofte restas sur LEOKADIO, kun fiero kaj pasio, sed ankaŭ kun ia timemo.)

MASTRO: Sed, Henriko!... Delongaj gekolegoj!... Via iama direktoro, Leokadio!

LEOKADIO: Kie estas tiu tempo, Prospero...

MASTRO: Kial vi ĝemas? Se iu progresis, estas vi! Certe, bela juna virino prosperas ĉiam pli facile ol ni.

HENRIKO (furioze): Preterlasu tion...

MASTRO: Kial vi ĉiam kriegas tiele al mi? Ĉar vi de nove estas unufoje kun ŝi?

HENRIKO: Silentu! De hieraŭ ŝi estas mia edzino.

MASTRO: Via...? (Al LEOKADIO): Ĉu li ŝercas?

LEOKADIO: Efektive, li edziĝis kun mi. Jes. —

MASTRO: Do, mi gratulas. Nu... Scevolo, Julio — Henriko edziĝis.

SCEVOLO (venas antaŭen): Mian bondeziron. (Li palpebrumas al LEOKADIO.)

JULIO same premas la manojn de ili ambaŭ.

GRAIN (al la MASTRO): Ha, kurioze — ĉi tiun virinon mi vidis, kelkajn minutojn, post kiam mi de nove estis libera.

MASTRO: Kiel do?

GRAIN: Ŝi estis la unua bela virino, kiun mi vidis post du jaroj. Mi estis tre emociita. Sed

alia sinjoro estis, kun kiu — (li daŭrigas paroli kun la MASTRO.)

HENRIKO (kun tono alte sonanta, kiel entuziasmigita, sed ne deklame): Leokadio, mia amata, mia edzino!.. Nun for pasis ĉio, kio estis iam. En tia momento multo forviŝiĝas.

SCEVOLO kaj JULIO iris malantaŭen; la MASTRO de nove antaŭe.

MASTRO: Kia momento?

HENRIKO: Ni nun estas kunigitaj per sankta sakramento. Tio estas pli, ol homaj ĵuroj estas. Nun Dio estas super ni; oni povas forgesi ĉion, kio okazis antaŭ tio. Leokadio, nova tempo komenciĝas. Leokadio, ĉio iĝas sankta, niaj kisoj, kiel ajn sovaĝaj ili estos, de nun ili estos sanktaj! Leokadio, mia amata, mia edzino!... (Li rigardas ŝin per arda rigardo): Ĉu ŝi ne havas alian rigardon, Prospero, ol tiun, kiun vi antaŭe konis de ŝi? Ĉu ŝia frunto ne estas pura? Kio estis, tio forviŝiĝis. Ĉu ne vere, Leokadio?

LEOKADIO: Certe, Henriko.

HENRIKO: Kaj ĉio boniĝis. Morgaŭ ni forlasos Parizon, Leokadio hodiaŭ la lastan fojon paŝos sur la scenejon de la Porte Saint Martin kaj mi hodiaŭ la lastan fojon ludos ĉe vi.

MASTRO (konsternite): Ĉu vi ja estas prudenta,

Henriko? — Vi volas forlasi nin? Kaj la direktoro de la Porte Saint Martin certe ne intencos lasi foriri Leokadion. Ŝi ja faras la feliĉon de lia teatro. La junaj sinjoroj amase kuregas tien, oni rakontas.

HENRIKO: Silentu. Leokadio foriros kun mi. Ŝi neniam forlasos min. Diru al mi, ke neniam vi min forlasos, Leokadio. (Brutale): Diru ĝin al mi!

LEOKADIO: Mi neniam forlasos vin.

HENRIKO: Se vi ja farus ĝin, mi vin... (Paŭzo.) Min tedas tia ĉi vivo. Mi volas trankvilon, trankvilon mi volas havi.

MASTRO: Sed, kion vi volas fari, Henriko? Tio ja estas ridinda. Mi faros proponon al vi. Se vi volas, forprenu Leokadion de la Porte Saint Martin — sed ŝi restu ĉi tie, ĉe mi. Mi ŝin engaĝos. Al mi ja efektive mankas talentaj virinoj.

HENRIKO: Mia decido estas firma, Prospero. Ni forlasos la urbon. Ni iros eksteren, kamparon.

MASTRO: Kamparon? Do, kien?

HENRIKO: Al mia maljuna patro, kiu vivas sola en mizera vilaĝo — mi ne vidis lin dum sep jaroj. Li apenaŭ jam esperas revidi sian perditan filon. Kun ĝojo li min akceptos.

MASTRO: Kion vi faros sur la kamparo? Sur la kamparo oni mortas pro malsato. La homoj tie vivas eĉ milfoje pli malbone ol en la urbo. Kion vi do volas fari tie? Vi ne estas tia viro, kiu kulturigas kampojn. Tion ne imagu.

HENRIKO: Oni vidos, ke mi ja estas viro ankaŭ por tio.

MASTRO: Baldaŭ nenia greno kreskos en la tuta Francujo. Vi iros renkonte al certa mizero.

HENRIKO: Al feliĉo, Prospero. Ĉu ne vere, Leokadio? Ofte ni sonĝis pri tio. Mi sopiras la pacon de l'vasta ebenaĵo. Jes, Prospero, en miaj sonĝoj mi vidas min vespere irantan tra kampoj, en silento senfina, super ni la mirindan, konsolantan ĉielon. Jes, ni forkuros el ĉi tiu terura kaj danĝera urbo; la granda paco venos super ni. Ĉu ne vere, Leokadio, ni ofte sonĝis tion.

LEOKADIO: Jes, ni ofte sonĝis tion.

MASTRO: Aŭskultu, Henriko, tion vi devas pripensi. Mi volonte pligrandigos vian salajron, kaj al Leokadio mi donos la samon, kiom al vi.

LEOKADIO: Ĉu vi aŭdas ĝin, Henriko?

MASTRO: Mi efektive ne scias, kiu anstataŭu vin ĉi tie. Neniu el miaj aktoroj havas ek-

pensojn tiel bonegajn, kiajn vi, neniu estas tiel favorata de mia publiko, kiel vi . . . Ne foriru!

HENRIKO: Tion mi ja kredas, ke neniu anstataŭos min.

MASTRO: Restu ĉe ni, Henriko! (Li sendas rigardon al LEOKADIO, kiu gestas, ke ŝi ja aranĝos la aferon.)

HENRIKO: Kaj mi promesas al vi, ke la adiaŭo iĝos malfacila por ili — por ili, ne por mi. Por hodiaŭ — por mia lasta prezentado, mi preparis ion, ke ili ĉiuj frosttremos . . . antaŭsento pri la fino de l'mondo alblovos ilin . . . ĉar la fino de ilia mondo estas proksima. Sed mi ĝisvivos ĝin jam nur de malproksime . . . oni rakontos ĝin al ni tie ekstere, Leokadio, multajn tagojn pli malfrue, ol ĝi okazis . . . Sed ili frosttremos, mi ĝin diras al vi. Kaj vi eĉ diros: Tiel bone Henriko neniam ludis.

MASTRO: Kion vi ludos? Kion? Ĉu vi scias ĝin, Leokadio?

LEOKADIO: Mi ja neniam sciiĝas pri io tia.

HENRIKO: Ĉu ja divenas iu ajn, kia artisto estas kaŝita en mi?

MASTRO: Certe oni divenas tion; tial mi ja diras al vi, ke oni kun tia talento ne enfosas sin sur kamparo. Kia maljusto kontraŭ vi mem! Kontraŭ la arto!

HENRIKO: Mi fajfas pri arto! Mi volas trankvilon. Tion vi ne komprenas, Prospero, vi neniam amis.

MASTRO: Hoho!

HENRIKO: Ne tiel, kiel mi amas. — Mi volas esti sola kun ŝi — jen, tiel estas . . . Leokadio, ni nur tiamaniere povos ĉion forgesi. Sed tiam ni estos feliĉaj, tiel, kiel neniam estis homoj. Ni havos idojn. Vi iĝos bona patrino, Leokadio, kaj bona edzino. Ĉio, ĉio estos forviŝita. (Longa paŭzo.)

LEOKADIO: La tempo iĝas malfrua, Henriko; mi devas iri al la teatro. Adiaŭ. Prospero, mi ĝojas, ke fine mi unufoje tamen vidis vian fame konatan butikon, kie Henriko havas tiajn triumfojn.

MASTRO: Kial vi neniam venis ĉi tien?

LEOKADIO: Henriko ĝin ne volis — nu, sciu, pro tiuj junaj sinjoroj, kun kiuj mi devus sidi ĉi tie.

HENRIKO (iris malantaŭen): Donu unu gluton al mi, Scevolo. (Li trinkas.)

MASTRO (al LEOKADIO, ĉar HENRIKO ne aŭdas lin): Vera stultulo, tiu Henriko — se vi ja ĉiam estus sidinta kun ili.

LEOKADIO: Vi, tiajn rimarkojn mi malpermesas.

MASTRO: Gardu vin, mi konsilas al vi, malsaĝa kanajlo. Iufoje li vin mortigos.

LEOKADIO: Kio okazis?

MASTRO: Hieraŭ jam denove oni vin vidis kun iu el viaj buboj.

LEOKADIO: Li ne estis bubo, vi stultulo, li estis . . .

HENRIKO (sin turnas rapide al ili): Kion vi murmuras? Neniajn ŝercojn, plaĉu al vi. Fino de flustrado. Sekretoj plu ne ekzistas. Ŝi estas mia edzino.

MASTRO: Kion vi donis al ŝi kiel edzan donacon?

LEOKADIO: Ho, Dio, li ne pensas pri tiaj aferoj.

HENRIKO: Nu, ankoraŭ hodiaŭ vi ricevos ĝin.

LEOKADIO: Kion do?

SCEVOLO, JULIO: Kion vi donacos al ŝi?

HENRIKO (tute serioze): Se hodiaŭ vi estos fininta vian ludadon, vi povos veni ĉi tien kaj vidi min ludi. (La ceteraj ridas.)

HENRIKO: Neniam ricevis iu ajn virino edzan donacon pli belegan. Venu nun, Leokadio, ĝis revido, Prospero; mi baldaŭ ree ĉeestos.

HENRIKO kaj LEOKADIO foriras. Samtempe eniras FRANCISKO vicgrafo de NOGEANT, ALBENO kavaliro de la TREMOUILLE.

SCEVOLO: Kia mizera fanfaronulo!

MASTRO: Bonan vesperon, vi porkoj.

ALBENO repaŝas timeme.

FRANCISKO (ne atentante): Ĉu tiu ne estis la eta Leokadio de la Porte Saint Martin, kiu ĵus foriris kun Henriko?

MASTRO: Certe ŝi estis tiu. Kio? — Ŝi fine eĉ vin memorigus, ke vi estas ankoraŭ io kiel viro, se ŝi tre multe penadus.

FRANCISKO (ridante): Ĝi ne estus neebla. Hodiaŭ ni venis iom frue, ŝajnas?

MASTRO: Dume vi ja povos pasigi la tempon kun via diboĉoknabo.

ALBENO volas kontraŭdiri.

FRANCISKO: Lasu do. Mi ja diris al vi, kiamaniere oni kondutas ĉi tie. (Al la MASTRO): Alportu vinon.

MASTRO: Jes, tion mi faros. Venos ja tiu tempo, en kiu vi estos kontentigitaj de la Seine-akvo.

FRANCISKO: Certe, certe . . . sed por hodiaŭ mi petas vinon, kaj eĉ la plej bonan.

MASTRO iras al la vinverŝejo.

ALBENO: Li ja estas terura bubo.

FRANCISKO: Komprenu do, ke ĉio estas ŝerco. Kaj krom tio, ekzistas lokoj, kie vi povas aŭdi tute similajn vortojn serioze parolitajn.

ALBENO: Ĉu tio ne estas malpermesita?

FRANCISKO (ridas): Oni ekkonas, ke vi venis el provinco.

ALBENO: Ha, ĉe ni okazis en lasta tempo ankaŭ aferoj tute belaj. La kamparanoj iĝas petolaj en maniero . . . oni jam ne scias, kiamaniere oni helpu sin kontraŭ tio.

FRANCISKO: Kion vi postulas? Tiuj kompatindaj diabloj estas malsataj; tio estas la sekreto.

ALBENO: Sed, kian kulpon mi havas en tio? Kian kulpon havas mia praonklo en tio?

FRANCISKO: Kial vi memoras pri via praonklo?

ALBENO: Jes, mi memoras, ĉar ili, sciu, havis kunvenon en nia vilaĝo — tute publike — kaj tiam ili nomis mian praonklon, la grafon de la Tremouille, tute simple akaparisto de greno.

FRANCISKO: Ĉu tio estas ĉiom?

ALBENO: Nu, mi vin petas!

FRANCISKO: Morgaŭ ni iros en „Palais Royal"; vi aŭdos tie, kiel malvirte parolas tiuj buboj. Sed, ni lasu ilin paroli; tio estas la plej bono, kion oni povas fari; enfunde ili estas bonaj homoj; oni devas lasi ilin elĉerpi sian furiozon en tiu ĉi maniero.

ALBENO (montrante al SCEVOLO kaj al la ceteraj): Kiaj suspektindaj subjektoj estas tiuj? Vidu, kiamaniere ili rigardas nin. (Li ekprenas sian spadon.)

FRANCISKO (retenas lian manon): Ne ridindigu vin! (Al la tri AKTOROJ): Vi ankoraŭ ne bezonas komenci; atendu, ĝis kiam pli multe da publiko ĉeestos. (Al ALBENO): Ili estas la plej honestaj homoj en la mondo — aktoroj. Mi vin garantias al vi, ke vi sidis jam kun pli gravaj friponoj ĉe sama tablo.

ALBENO: Sed tiuj estis pli bone vestitaj. (La MASTRO alportas vinon.)

MIKANJO kaj FILINJO eniras.

FRANCISKO: Jen, ni ĉeestas jam. Venu do, Filinjo. — Ŝi estas ankoraŭ iom timema.

FILINJO: Bonan vesperon, juna sinjoro!

ALBENO: Bonan vesperon, sinjorinoj!

MIKANJO: Tiu ĉi etulo estas ĉarma. (Ŝi eksidas sur la genuoj de ALBENO.)

ALBENO: Sed, mi petas, Francisko, klarigu al mi, ĉu ili estas honestaj virinoj?

MIKANJO: Kion li diras?

FRANCISKO: Ne, tio ne estas tiel; la sinjorinoj, kiuj venas ĉi tien — Dio, kiom malsaĝa vi estas, Albeno!

MASTRO: Kion mi povas alporti al la dukinoj?

MIKANJO: Alportu al mi vinon, iun tre dolĉan.

FRANCISKO (montrante al FILINJO): Ĉu amikino?

MIKANJO: Ni kune loĝas. Ni eĉ havas kune nur unu saman liton.